ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)
REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Felletona red.: Zanoni.
ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtĉekkonto Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.
ANONCOJ
el ĉiuj landoj 4 germ. mk., po cm², ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato.

ESPERANTO
★ TRIUMFONTA ★

Internacia **SEMAJNA** **Neŭtrala**

Abonon ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed **ne** per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe **admonilon.** — Abonoj povas esti -- -- - komencataj per iu ajn numero. - --

Por **Abono** oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.30 svis. fk., 0.30 dana aŭ norvega kr., 0.30 peseto, 3½ pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fk., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 3 germ. mk. (ankaŭ por baltaj kaj balkanaj ŝtatoj; por rusoj 1 germ. mk.), 7.50 hung. kr., -- -- 35 pol. mk., 35 aŭstr. kr.; internacie 1½ respond-kuponoj. -- -- --

Por adresŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 5 numeroj. — Liston de niaj **Abonejoj** en diversaj landoj vidu sur pago 4! — **Germanoj** ĝuas altan profiton, se ili abonas ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 15. Nachtrag, Ergänzungsheft n-o 3, pago 280, -- -- sub „Kunstsprachen"). -- --

Kio gvidas al la celo?
Unueco, solidareco, seriozeco.

Numero 79 :-: **Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa** :-: **9. Aprilo 1922.**

Danzig — Helsinki — Nürnberg.

En la hodiaŭa numero ni publikigas la unuan komunikon pri la Internacia Antaŭkongreso en **Danzig** kun kelkaj ilustraĵoj, la sesan komunikon pri la Internacia Kongreso en **Helsinki** kaj memorskribaĵon de la Esperantistaro de **Nürnberg** pri aranĝo de Internacia Kongreso 1923 en tiu urbo. Kiel oni scias, **ankaŭ** kelkaj aliaj urboj invitis la XV-an (Bologna, Warszawa k. a.); en iu venonta numero ni provos objektive priparoli tiun aferon.

.....

Internacia Antaŭkongreso en Libera Urbo Danzig.

Ni jam publikigis, ke Senato de „Libera Urbo Danzig" donis al nia Asocio monatan subvencion de 1000 gmk. por plenumo de organizaj laboroj de Internacia Antaŭkongreso en Danzig. Estas tre grava subteno de nia movado; ĉar „Libera Urbo Danzig" nove fondita kaŭze de la pactraktato estas tre malgranda ŝtato, kaj la donacita nur por Antaŭkongreso monsumo proporcie valoras multe pli ol granda subvencio de multe pli granda ŝtato. Krom tio Danzig kiel ponto inter Germanlando kaj Polujo ĝuste nuntempe havas tiom da internacia intereso, ke la de ĝia estraro subtenata movado frapas la okulojn de la tuta mondo. Tion la Esperantistaro bonvolu serioze pripensi. Do por antaŭenpuŝi la malfortan movadon en la proksimaj orientaj regionoj estas nepre necese, ke grandnombra parto de veturontoj al Helsinki vizitu Danzigon por partopreni Internacian Antaŭkongreson, per kiu ni prave montru la praktikan utilecon de nia lingvo.

Unu malhelpaĵo devas esti forigota. Ekzistas ĝis nun neniu konstanta ŝiplinio inter Danzig kaj Helsinki. Ni jam de kelkaj monatoj interrilatis pri la afero kun L. K. K. en Helsinki, sed tute sensukcese. Ankaŭ d-ro Möbusz el Lübeck skribis, ke ne estos eble, haltigi ŝipon en Danzig. Ni priparolis la aferon kun ĉiuj ĉi tieaj ŝiparanĝejoj kaj eksciis jenon:

Luado de ŝipo de Danzig al Helsinki kostos ĉ. 200000 gmk. Kiam ni ĝustatempe volas ricevi ŝipon por la kongresanoj, tiam ni devas zorgi pri tio, ke sumo de 200000 gmk. estas disponigota al banko en Danzig jam almenaŭ du monatojn antaŭ la forveturo. Do nia plej urĝa peto al la Esperantistoj, kiuj certe vizitos Helsingforson kaj ĉitiuokaze ankaŭ venos Danzigon, estas:

Anoncu al ni tuj vian ĉeeston kaj transpagu 2000 gmk. al „Deutsche Bank, Filiale Danzig, Esperanto-Kongress"! Skribu treege legeble kaj menciu sur la transpagilo la celon de la monsendo! La troa mono estos redonata!

Ni atentigas pri la ebleco loĝi sur la luota ŝipo dum la kongrestagoj. Se ne estos anoncitaj sufiĉe da partoprenontoj, kaj tial ni ne povos lupreni ŝipon, ni organizos ĝustatempan alvenon en Stettin. La forveturo de tie verŝajne okazos la 2-an de aŭgusto.

Provizora programo.

Unua tago: *Danzig.* Vizito de vidindaĵoj de la urbo. Tagmeze komuna tagmanĝo. Vespere oficiala manifesto, poste vizito de koncerto.

Dua tago: *Oliva.* Veturo al Oliva, vizito de antikva monaĥejo kaj ĝardenego, promenado tra la belega arbaro al Karlsberg kaj ĝuo de belrigardoj sur la ĉarmegan marbordan regionon. Tagmeze komuna tagmanĝo.
Zoppot. Posttagmeze veturo al mondkonata marbanloko Zoppot kaj ĝuo de la marborda vivo. Poste promenado al proksima bela rigardejo. Vespere partopreno je festo; poste dancado.

Tria tago: Adiaŭo kaj forveturo.

(Laŭdezire ni eble aranĝos tutan tagon por Zoppot kaj petas proponojn!)



Danzig. — Longa Ponto kun „Krantor" **(Levila Pordego).**

Kongreskotizaĵo.

Usono 1 dol., Nederlando 2 hfl., Svisujo 5 svis. fk., Danujo, Norvegujo, Svedujo 5 kr., Italujo 5 lir., Britujo 5 ŝil., Hispanujo 5 pes., Finnlando kaj Ĉeĥoslovakujo 15 fmk. aŭ kr., Germanujo kaj Danzig 30 gmk., Rumanujo 30 lej., Bulgarujo 40 lev., Jugoslavujo 50 kr., Aŭstrujo kaj Hungarujo 100 kr., Polujo 300 pmk., aliaj landoj 30 gmk. en nacia valuto.

Precizajn detalojn ni komunikos ĝustatempe en ĉiuj Esp. gazetoj.

Monsendojn bonvolu direkti al „Deutsche Bank, Filiale Danzig, Esperanto-Kongress".

Ĉiujn aliajn sendaĵojn adresu „Esperanto-Amt Danzig, Herrengartenkaserne".

Demandante oni ĉiam aldonu valorajn respondkuponojn aŭ bankbiletojn ne ĉifonitajn por afranko; alie ni bedaŭrinde ne povos respondi.

Loka Kongresa Komitato.
S-ino Anna Tuschinski, Ketterling, Aeltermann, Amort,
Kielbratowski, del. UEA, W. Hoffmann, M. Neumann, Klaps, Klara Tuschinski, Gertr. Vorhauer.

.....

XIV-a Universala Kongreso de Esperanto

en Helsinki-Helsingfors, Finnlando
8.—16. aŭgusto 1922.

Sesa Komuniko.

1. *Kongresejoj.* La kanceleja komisiono de la parlamento konsentis doni je nia dispono salonojn en la Malnova Parlamentejo (Säätytalo), kiu nuntempe estas uzata kiel kunvenejo de la parlamentaj komisionoj. En la Malnova Parlamentejo povos okazi ĉiuj fakaj kunsidoj. Por la malfermo kaj verŝajne ankaŭ por la laborkunsidoj ni devas serĉi aliajn ejojn. La malfermo espereble okazos en la Nacia Teatro kaj por la laborkunsidoj ni intencas lui la domon de la Studentaro de la Universitato en Helsinki, kie ankaŭ troviĝas konvenaj ejoj por sekretariejo, poŝtoficejo, ekspozicio ktp.

2. *Afiŝoj.* La afiŝoj, trikolora presaĵo laŭ linoleumaj klišoj tranĉitaj de artisto Vasström, estas nun iom post iom ekspedataj. La Esperantistaj societoj, firmoj kaj privatuloj, kiuj povas ĝin elmeti favore, estas petataj sendi al ni sian adreson por senpaga ricevo de la afiŝo.

3. *Fakaj kunsidoj.* Finnlanda Foiro invitas ĉiujn foirojn partopreni per reprezentantoj, Esperante parolantaj, en faka kunsido de la foiroj.

4. *„Vojaĝado en Finnlando."* La eliro de la nova eldono estas iom prokrastita ĉefe pro anonckolektado daŭrigata. Ĉiuokaze ĝi eliros sufiĉe frue antaŭ la ekveturo de la kongresanoj.

5. *Ekspozicio.* Ĝis nun ni ricevis preskaŭ **nenion por ekspozicio. Ni petas la samideanojn** diverslandajn sendi, ĉu donace, ĉu prunte, ekspozindajn ajojn.

6. *Korespondado.* La korespondemuloj kaj interŝanĝemuloj estas petataj ne sin turni al la L. K. K., sed meti anonceton en „Esperanta Finnlando". Kosto sama kiel por 1 folio da glumarkoj (vidu la preztabelon en la 2-a komuniko).

7. *Novaj aliĝoj:*
196.—197. Ges-oj Martin kaj Louise Blicher, Köbenhavn.
198. s-o Oskar W. Wigren, Helsinki.
199.—200. ges-oj A. kaj Emmy Korpelainen, Kemi.
201. s-o Iisakki V. Ahonen, Seinäjoki.
202. s-o Uuno Hiltunen, Kurkimäki.
203. s-o Kalle Väisälä, Tarto.
204. s-o Edmund Grünthal, Tallinn.
205. s-o Rudolf Blaufeldt.
206. s-o Ernst Blaufeldt, Tarto.
207. s-o David Henderson, Boston Spa.
208. s-o Róbin, Varsovio.
209. s-o Urho Sarajas, Rotterdam.
210.—211. ges-oj Alberto kaj Loti Alessio.
212. s-o Giovanni Alessio, Padova.
213. f-ino Ida Metzger, Nürnberg.
214. s-o Kaarlo A. Viherlehto, Kärppälä.
215. s-o Stefano Lubliner.
216. f-ino Karolina Lublinerówna, Varsovio.
217. f-ino Alison Nicol.
218. f-ino Agnes B. Nicol.
219. f-ino Mary Ramsay.
220. f-ino Meg Kennedy, Glasgow.
221. f-ino A. M. van Roode, Culemborg.
222. f-ino Aini Ohlsson, Turku.
223. s-o Paul Berg.
224. f-ino Maria Ambroshunas.
225. f-ino Linda Birk.
226. s-o Augusto Birk.
227. s-o Heinrich Mark, Tallinn.
228. f-ino Grete Neiser, Banska-Bystrica.
229. s-o Filip Kurjanski, Bialystok.
230. s-o Jakob Hechtl, München.

La ĝisnunaj aliĝintoj estas el sekvantaj landoj: Germanio 30, Estonio 23, Pollando 20, Britlando 18, Nederlando 14, Ĉeĥoslovakio 10, Franclando kaj Aŭstrio po 7, Hungario 5, Italio 4, Svislando 3, Litovio kaj Danlando po 2, Svedlando, Hispanio, Usono, Turkio, Kanado kaj Japanlando po 1, Finnlando 79, entute 230 aliĝintoj el 20 landoj.

8. *Helpkongresanoj:* La sekvantaj personoj aliĝis kiel helpkongresanoj:
7. s-o George D. Buchanan, Glasgow.
8. s-o Eduard Zoubek, Wien.
9. s-o Karl Bartel, Graz.

9. *Garantia kapitalo.* La L. K. K. danke notas la jenajn garantiojn: S-o Martin Blicher, Köbenhavn 100.— fmk., s-o Kalle Väisälä, Tarto 500.— fmk., f-ino Grete Neiser, Banska-Bystrica 100.— fmk. Sume 700.— fmk., antaŭa sumo 13400.— fmk., entute 14100.— fmk.

10. *Blindula kaso.* La L. K. K. danke notas la jenajn donacojn por la eldona kaso de la blindaj Esperantistoj: S-o E. Grünthal, Tallinn 14.— fmk. (100.— est. mk.), s-o R. Blaufeldt, Tarto 3,15 fmk. (22,50 est. mk.), s-o D. Henderson, Boston 56,05 fmk. (—5/1½ pund. sterl.), s-o E. Zoubek, Wien 0,60 fmk. (60.— aŭstr. kr.), f-ino Grete Neiser, Banska-Bystrica 31.— fmk., s-o Filip Kurjanski, Bialystok 1.— fmk. (100 aŭstr. kr.). Sume 105,80 fmk, antaŭa sumo 396,68 fmk, entute 502,48 fmk.

11. *Donacoj.* La L. K. K. danke notas jenajn donacojn: S-o E. Grünthal, Tallinn 6,30 fmk. (45.— est. mk.), s-o D. Henderson, Boston Spa 54,60 fmk. (—5/— pund. sterl.), s-o A. Alessio, Padova 33,75 fmk. (15.— lir.), s-o E. Zoubek, Wien 0,60 fmk. (60 aŭstr. kr.), f-ino Grete Neiser, Banska-Bystrica 31.— fmk. Sume 126,25 fmk., antaŭa sumo 6291,61 fmk., entute 6417,86 fmk.

La Loka Kongresa Komitato.

Adreso: Poŝta (ankaŭ por monsendoj): XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinki, Finnlando.
Telegrafa: Esperanto, Helsingfors.

.....

Kie ni kongresos en 1923?

(Memorskribaĵo de Esp. Kartelo Nürnberg-Fürth.)

I. En Germanlando.

1. Por ebligi la partoprenon je Universala Kongreso al kiel eble plej multaj samideanoj, ankaŭ en venontaj jaroj Universala Kongreso povos okazi nur en malbonvaluto lando.

2. La orientajn landojn oni jam favoris per la Praha Kongreso, la nordajn landojn per la elekto de Helsinki. Nun la vico estas ĉe mezeŭropaj landoj.

3. Aŭstrio, Hungarujo, Polujo kaj Danzig, pro la diritaj kaŭzoj, krome pro siaj necertaj politikaj cirkonstancoj, apenaŭ estas konsidereblaj. Kontraŭ tio Germanujo šajnas tute taŭga por 1923.

4. Ni bezonos post la (verŝajne ne tre bone vizitota) Helsinki'a Kongreso, jam pro propagandaj kaŭzoj, refoje imponan kongreson, kiu evidentigos jam eksteren per sia multnombreco la grandegan evoluon de nia movado en la pasintaj jaroj.

5. Germanujo garantias tian kongreson per sia propra multnombra Esperantistaro, same kiel bonega kaj facile atingebla vojaĝcelo por eksterlandaj samideanoj.

6. La demando: Ĉu Germanujo? estas jam priparolita en Praha: Montriĝis ĝojige, ke ankaŭ



Danzig. — Urbdomo.
„Longstrato" ĝis „Artus-puto"; la malantaŭa parto nomiĝas „Longforejo".

la iam malamikaj landoj principe tute ne antipatiis la elekton de germanlanda urbo; sole la urbo Wiesbaden, situanta en ekzcipita teritorio, ŝajnis neoportuna.

7. Nordgermanujo (Hamburg) estus ja oportuna por nordaj ŝtatoj, sed des pli maloportuna por sudeŭropanoj, eĉ por sudgermanoj. Mezgermanujo jam havis unufoje Universalan Kongreson (Dresden, 1908). Do restas, kiel kongreslando, nur Sudgermanujo, ĝuanta oportunan situacion kaj ĝeneralajn simpatiojn en- kaj eksterlande.

II. En Nürnberg.

1. Nürnberg, la plej favora kongresurbo de Germanujo, la bonfama art- kaj komercurbo kaj moderna grandurbo kun 500 000 loĝantoj, enhavas programon en si mem.

2. Nürnberg estas gastama urbo, kiel unuanime konstatas ĉiuj fremduloj; ĝi estas ankaŭ bone atingebla kongresurbo kun bonaj hoteloj. La multsperta porfremdula unuiĝo, loĝiginta multajn samgrandajn kongresojn, promesis jam sian tutfortan apogon.

3. Nürnberg havas idealajn kongresajn ejojn kaj salonegojn (Herkules-salono, urba teatro, kulturunuiĝa domo, urbparka restoracio ktp.).

4. Nürnberg, la mezepoka juvelujo de Germanlando, estas unu el la plej vidindaj urboj de Eŭropo, allogas same la historiulon, la artamanton kaj la plezuremulon (kastelo, urbdomo, muzeoj, galerioj, preĝejoj, monumentoj, naturteatro, promenadoj, Dutzend-lago, bestparko, ktp.).

5. Nürnberg prezentas maloftajn eblecojn por dankaj najbaraj ekskursetoj, ekz. Frankan Svisujon, Rothenburg, Bamberg, Solnhofen. Ĝi havas plie bonajn fervojajn rilatojn al la bavara sudo (München, Alpoj).

6. En Nürnberg, la historia lulilo de Esperanto, vivadis niaj unuaj meritplenaj pioniroj, estiĝis la iua Esperanta organizajo kaj la unua Esperanta gazeto. Ĝi estos vere ideala starejo por jubilea kongreso.

7. Nürnberg nuntempe denove ludas gravan gvidantan rolo en la movado, enhavante multnombran bonorganizitan Esperantistaron, vastan Esperantan instruadon en ĉiugradaj kaj ĉiuspecaj lernejoj kaj eksterordinaran apogon flanke de estraroj, urba konsilantaro, gazetaro, komerca ĉambro, publiko.

8. Nürnberg estas progresema kultejo por ĉiuj modernaj movadoj. Laboristoj, scienculoj, teozofoj, katolikoj, blinduloj, Frey-Liganoj, framasonoj, judoj, virinoj ktp. trovos samidealan bazon por siaj fak-kunsidoj.

Resume: Nürnberg estus vere ideala sidejo por Universala Kongreso de Esperanto, kaj estas tial nepre rekomendinda por la XV-a en 1923.

Lernejo.

En Cologna-Veneta, Italio,

d-ro Toschi, itala delegito por la konferenco de Genève, komencis meze de marto „eksperimentan" kurson al la geprofesoroj kaj geknaboj de l' Teknika Mezlernejo, kie li mem profesoras. Sume 50-o da gelernantoj. Direktoro de la lernejo kaj urbestra moŝto donis al d-ro Toschi oficialan reprezentantecon ĉe la konferenco de Genève.

En Aŭstrio

la landa lerneja konsilantaro en Wien permesis per dekreto de 25. febr. 1922, Z. II. 1008, la aranĝon de kvinmonata Esp. kurso en du lecionoj posemajne ĉe la burĝa lernejo por geknaboj en Purkersdorf; instruas burĝlerneja direktoro Josef Schamanek. S-o Sch. instruas Esperanton ankaŭ ĉe la blindulejo en Purkersdorf (19 p.) kaj ĉe Teknika Altlernejo en Wien (12 p.).

Karnavalo en Esperantujo.

La Karnavala Numero*) de ET (n-o 73) surprizis ĉiujn legantojn, ĉar ĝi aperis tute neatendite. La plimulto, ni povas eĉ diri preskaŭ ĉiuj, estis ĝoje surprizitaj, dume al kelkaj la numero ne plaĉis. Inter la multenombraj alskriboj, kiujn ricevis la redakcio de ET pri la karnavala numero, troviĝis unu nepre malaproba, de unu el la plej sinceraj amikoj de nia ĵurnalo, kaj kelkaj, al kiuj la eldono de tia numero ŝajnis nekutima, dum preskaŭ ĉiuj aliaj esprimis plenan kontentiĝon.

La redakcio de ET mem jam ofte klarigis sian vidpunkton pri la neceso de seriozeco en nia movado; ĝi tamen opiniis, ke unufoje en la jaro oni rajtas ridi kaj ridigi, en satira bonhumora maniero prikritiki la kritikindaĵojn en nia movado. Ofte tiaj satiraj malkaŝoj sukcesas pli bone ĉe la koncernatoj ol longaj artikoloj kun sekaj argumentoj.

Unu tre sprita leganto sendis al ni bele sukcesintajn fotografaĵojn de Marso kaj Venuso, el kiuj tiu de la ĉarma gardistino de la naturparko sur Venuso tuj ekflamigis la koroin de la tuta ET-kontoranaron. Interese estas ankaŭ, ke la poŝto trovis nin laŭ la adreso: „Esperanto Trionfunta, Köln, Harem (!), Germandojĉlandiujo".

Iu el la legantoj, laŭ sia konfeso, tiom ridegis pro la karnavala numero, ke li „malsaniĝis", alia „povas preskaŭ ne skribi, ĉar li estas tiom lacigita je ridado", tria eĉ „mortis".

Malnova pioniro de Esperanto, Akademiano, skribis: „Grandan plezuron kaj eĉ kuraĝigon alportis al mi la legado de la gazeto, kiun mi legis de la komenco ĝis la fino! Kaj pro tio mi vin dankas kaj gratulas. Ni ne ĉiam ploru en Esperantujo! Bone estas ridi kelkafoje kiel eble plej ofte."

Jen aliaj juĝoj:

„. . tio estis granda sukceso kaj bonega propagandilo por Esperanto!"

„. . . alia pruvo, ke Esperanto estas vivanta lingvo."

„Eble kelkaj malgajuloj krios pro malrespekto al serioza movado kiel nia. Ili malpravos. Vi refoje konvinkis min, kiom taŭga por ĉion esprimi estas nia lingvo."

„N-o 73 de ET estas ununura okazajo en Esperantujo kaj tutege estas sukcesinta. La pravaj mokajoj eble sukcesos sanigi la samideanaron, kies pli granda parto suferas je neforigeblaj malsanoj. Tiaj operacioj, ofte ripetataj, pensigos multajn s-anojn pri iliaj neĝustaj propagandmetodoj. — Alio estas, ke la n-on ricevos multaj komencantoj, kies enhavo konfuzigos multajn. Ĉiuokaze neatendita novaĵo!"

Eĉ prof. Peano, prez. de „Academia pro Interlingua", esprimis siajn „Gratias pro Esperanto Trionfunta, pleno de spiritu et de bono humore"

Ankaŭ pri la efiko de l' anoncoj en la karnavala numero ni havas pruvon. Ekzemple tiu pri „Esperanta Ligilo" rezultigis pluan donacon. Jen kion skribis la donacintino: „Legante vian dankon en n-o 73 de ET, malmulte sed korege por blinduloj de Esp. Ligilo."

Ankaŭ en la Esp. gazetaro nia karnavala numero trovis eĥon. „Holanda Esperantisto" recenzis ĝin per jenaj vortoj: „Ke nia lingvo jam tiom maturiĝis, ke kompilo de tia amuziga numero estis ebla, jen kio superis niajn revojn!" — „The British Esperantist" rekomendas la havigon de la karnala numero al ĉiu, kiu povas, kaj esprimas siajn korajn gratulojn kaj dankojn.



Danzig. — Preĝejo de **Sankta** Mario.

Ĝenerale, oni do rigardas la karnavalan numeron kiel bonan pruvon pri la taŭgeco kaj esprimebleco de nia lingvo. Tamen ankaŭ la malaprobantoj ne estas malpravaj. Se en unu loko oni rigardas la karnavalan numeron kiel „bonegan propagandilon" kaj en alia loko kiel „danĝeron por la disvastigo de Esperanto", la diferenco de la opinioj dependas de la diferencaj cirkonstancoj. Do, en venonta jaro ni prefere presos la karnavalan numeron kiel apartan aldonon.

Citinde estas ankoraŭ, ke ankaŭ „Hungara Esperantisto" eldonis apartan folion „Karnavalaj Bombonoj", lerte redaktitan de s-anoj Baghy, Balkanyi k.a.

*) La Karnavala Numero de ET estas ankoraŭ havebla por la kutima prezo.

Poŝto.

En Regensburg (Germ., Bav.)

s-o Postamtmann Jakob el München faris paroladon antaŭ la gepoŝtoficistoj de la supera poŝta direkcio Regensburg, al kiu aldonis s-o poŝta inspektoro Altnöder kelkajn pruvojn pri la progreso de Esperanto ktp. Nun la supera poŝta direkcio anoncis kurson por plur- kaj alian por unulingvuloj; partoprenas ĉ. 60 resp. 30 personoj; gvidanto s-o Altnöder.

Fervojistoj.

Fervojista faka kongreso dum la XIV-a en Helsinki.

La preparoj por tiu ĉi kongreso akceliĝis nun tiel, ke oni elektis provizoran lokan komitaton, al kiu apartenas s-o librotenisto S. Veijola, s-o vagonaro-ekspedisto T. Nikolainen (adreso: Helsinki, asema-konttori) kaj la subskribinto. Oni vizitis ĉefdirektoron de la fervoja administracio s-on B. Vuolle, kiu tre afable akceptis la komitaton kaj volonte promesis permesi monkolektadon inter finnlandaj fervojistoj por la bono de eksterlandaj kolegoj. Li tre simpatie parolis pri Esperanto kaj petis nin kolekti statistikon pri Esp. fervojistoj en nia lando. Fine li admonis nin ensendi petskribon pri subvencio al la fervoja administracio kaj promesis, se eble, eĉ cedi litvagonon kiel loĝejon por niaj gastoj.

Malgraŭ tio, ke la nombro de finnlandaj Esperantistaj fervojistoj kredeble ne estos granda, ni penos fari ĉion por sukcesigi la kongreson. Ni jam dissendis presitan cirkuleron al ĉiuj stacioj kaj plej gravaj gazetoj kaj turnos nin ankoraŭ al kelkaj fervojistaj organizajoj en nia lando. Aliĝojn por la kongreso akceptos s-o S. Veijola kaj la subskribinto.

Do bonvenon al la bela, somera Finnlando, lando de mil lagoj!

H. Salokannel, fervoj-oficisto,
stacio Laihia, Finnlando

Esperanta Ekspozicio en la Lerneja Muzeo en Kopenhago.

Kun permeso de la „Lerneja Muzeo" en Kopenhago „Esperanto Unuiĝo de Danaj Instruistoj" aranĝis ekspozicion en unu el la muzeaj ĉambregoj de 20. febr. ĝis 20. marto.

Ĉar la ekspozicio speciale celis montri la jam tre riĉan instrumaterialon, kiu ekzistas en Esperanto, ĉi tiu fako estis la plej ampleksa, sed ankaŭ la literaturo estis montrata per la plej bonaj kaj mondkonataj nomoj; pli malgrandaj fakoj estis reprezentataj de UEA, Ruĝa Kruco, turismo, komerco, gazetaro, Esperanto dum la milito, scienco, verkoj pri Esperanto en aliaj lingvoj, reklamoj ktp Entute la ekspozicio estis aranĝita tiel, ke la vizitantoj ricevis bonan impreson pri la Esp. movado kaj ĝiaj praktikaj rezultatoj.

Dum la ekspozicio okazis kvar paroladoj, la prez. de C. D. E. L., s-o Martin Blicher, parolis dufoje pri Esperanto kaj mondlingvoj" kaj tre interese prezentis la diversajn provojn pri solvo de la problemo, ĝis fine Esperanto sin montris kiel la sola praktika inter la konkurantoj. S-o instruisto J. Christoffersen parolis pri „Kial mi fariĝis Esperantisto" kaj f-ino Margrethe Noll parolis pri „D-ro Zamenhof kaj lia verko Esperanto".

Tri novaj kursoj estas komencitaj. F-ino Asta Mikkelsen, prez. de la unuiĝo, gvidas unu por geinstruistoj kaj unu por 12 knaboj de sia propra lernejo, kaj f-ino M. Noll gvidas alian por komencantoj.

La kurso por la knaboj okazas ekster la lernejo plano sed post la instruado en la lernejo kun permeso de la inspektoro, la gepatroj kaj la klasa instruisto. Cetere la direktoro de la komunumaj lernejoj ĉiam afable permesas uzadon de lerneja ĉambro por Esp. instruado.

La inspektoro de la Lerneja Muzeo, s-o instruisto Christensen, tre interesiĝis pri Esperanto. Li intencas uzi ĝin praktike en la servo de la muzeo. Esp. Unuiĝo de Danaj Instruistoj promesis sian servon ĝis li mem lernis la lingvon. Se eksterlandaj kolegoj deziras scii ion pri la muzeo kaj ĝia interesa kolekto de instru-materialo kaj pri la diversfakaj instru-metodoj kaj sistemoj, kiuj estas demonstraciataj tie, oni sin turnu al: Skolemusæet, Stormgade 3, Kopenhago. Al la inspektoro treege interesas konantiĝi pri nova instru-materialo, novaj metodoj aplikataj en aliaj landoj, kaj tial li estas tre dankema, se kolegoj eksterlandaj volas interrilati kun li per Esperanto pri ĉi tiuj temoj.

Eksterlandaj gekolegoj, kiuj vizitos Kopenhagon, ne forgesu viziti la tre interesan muzeon (malfermata ĉiutage de 3—5 h. krom sabato kaj dimanĉo).

M. N.

La Trubaduro.*)

De J. L. Perec.

En plej malbonaj tempoj troviĝas bonkoraj homoj, kiuj ŝatas almenaŭ alporti bonajn sciigojn. Kaj kiam la poeto ekhavis sian unuan leganton, troviĝis bonaj homoj, kiuj suprengrimpis al la plej alta etaĝo kaj eniris la tegmentĉambron de la poeto, por diri al li „bonan felicon".

„Bonan felicon al vi, poeto, oni komencas vin legi kaj kompreni." Kaj kiam la poeto ne ekĝojis, ili aldonis:

„Estas vere, ke ‚unu hirundo ne faras someron'; sed tamen ĝi ne estas malproksima. Venos la tago, kiam viaj kantoj elsonos tra ĉiuj fenestroj, viaj melodioj estos kantataj en la kortegoj, patrino dormigos sian amatan infanon per via dolĉa kanto; viaj flugilhavaj vortoj estos en la gefianĉa buŝo, kaj la malriĉa blinda almozulo en la strato haltigos la trapasantojn per viaj ĉarme fluantaj himnoj."

Tiel parolis la bonaj homoj, kaj tamen la poeto ne ekĝojis, sed respondis al ili per malĝoja voĉo:

„Mi ne havas, per kio regali vin por la bona sciigo. Hieraŭ mi kun mia kanario formanĝis la lastan pecon da sukero. Tial, se vi volas, mi donos al vi rakonteton."

Ili montris dolĉ-acidan mienon kaj konsentis.

* * *

Antaŭ longa, longa tempo en malnova forta kastelo estis festo — triobla festo. La kastelestro festis sian nomtagon, li revenis de la batalkampo, kiel venkinto, kaj — li venigis kun si belulinon-kaptitinon.

Iluminado.

Sur la verdaj, malvarmaj brustoj de l' akvo, kiu ĉirkaŭas la kastelon, naĝis brulantaj bareloj plenaj je peĉo. La malnovajn murojn oni ĉirkaŭpendigis per girlandoj kaj per diverskoloraj lampetoj ĝis la plej altaj pintoj. La loĝantaro de la valo garde staris la tutan nokton sur la malgrandaj tegmentoj kaj forigis la fajrerojn, kiuj al ili flugis el la kastelo. La gotaj fenestroj flamis kvazaŭ sangoplenaj fantomokuloj

Kaj en la salono, kie okazas la granda festeno, regas brilego! Flamas bonodorantaj vakskandeloj, faireras diademoj sur kapoj de sinjorinoj, sur la zonoj ĉe herooj; brilas oraj, arĝentaj kaj kristalaj pokaloj sur la tablo, kaj brulas la vizaĝoj pro vino, la okuloj de sinjorinoj ĵetas fajrerojn . .

Kaj tamen estas malĝoje ĉe la tablo.

„Vino, virino estas," diras per raŭka voĉo la barono, „kie estas kanto?"

„Granda, potenca venkinto," oni respondis, „estis en via lando trubaduroj . kaj ili kantis antaŭ vi malrespektajn kantojn, kaj ni pendigis ilin laŭ via ordono."

„Ĉu restis neniu por kanti ĉe la tablo?"

La korteganoj silentas, nur unu maljuna ĉambristo alproksimiĝas kliniĝante kaj diras:

„Unu, kiu ankoraŭ ne havis la honoron kanti antaŭ viaj okuloj, restis. Li estas en la valo . Lia patrino estas mortanta, kaj li sidas ĉe ŝia lito, kaj per sia kanto li forpelas de ŝiaj okuloj la timon pro la morto."

„Venigu lin!" sonas la mallonga ordono de la barono.

Kaj oni lin venigis, forĝitan en katenoj

* * *

„Se vi volas min mortigi," diras la trubaduro, „faru tion tuj, mia animo renkontu la animon de mia patrino sur la vojo "

„Kantu!" ordonas la barono.

„Forprenu de li la katenojn!" li turnas sin al la halebardistoj, kiuj venigis lin.

„Kion mi kantu al vi? demandas la trubaduro.

„Kantu pri mia venko . . . ; pri la urboj, kiujn mi forbrulis; pri la kasteloj, kiujn mi ruinigis pri nukoj de herooj, sur kiujn mi metis mian piedon; pri la sangantaj kapoj sur la pintoj de niaj bajonetoj . ; pri la brilo de la multekostaj trezoroj, kiujn mi forrabis!"

„Tion mi ne povas, barono! Sorĉumita estas mia citro, kaj se mi ekmovos ĝiajn kordojn, la riveroj de sango, kiujn vi disverŝis, komencos boli . . kaj la ĝemado kaj insultado de mortigitoj vekiĝos, kaj la fajfado de fajraj serpentoj, kaj la sufokata kriaĉo de senhonorigitaj virinoj, kaj la tim-krioj de frakasataj infanoj — ĉi tio vekiĝos — kaj ne ĝojon mi al vi donos, sed timon — teruran timon, viaj okuloj eliĝos el via kapo, kaj viaj haroj disiĝos, kiel serpentoj . "

„Silentu!" ordonas la barono, sed ekregante sin li daŭrigas:

„Nu, kantu la belecon de mia kaptita amatino. Kantu pri ŝiaj okuloj, kaj komparu ilin al la steloj; pri ŝia pala vizaĝo — kaj komparu ĝin al la plej pura marmoro; pri ŝia fleksebla korpo, kaj komparu ĝin — nu, vi mem trovu la komparon!"

„Sankta kaj pura estas mia citro," respondas la trubaduro, „honton kaj pekon ĝi ne ludas . . . Unu kordo disŝiriĝos post la alia Nur ŝian malfelicon mi povas prikanti — la vundojn, kiuj ekfloros sub viaj pekaj kisoj, la estingiĝon de ŝiaj okuloj, kion vi elsucos per viaj hontsoifantaj lipoj ."

„Silentu!" Sed li denove ekregas sin, li ne volas hontindigi al si la trioblan festotagon. „Kantu pri ĝojo — pri vino, kiu perlas en oraj

„Sango perlas sin en viaj pokaloj," interrompas la trubaduro, „ŝviton kaj sangon sucas viaj lipoj . ."

La barono faras signon, ke li silentu, kaj turnas sin al siaj gastoj:

„Tri fojojn respondis al mi la trubaduro; ĉu vi komprenis liajn parolojn?"

„Eĉ ne unu vorton," respondas ĉiuj, kvazaŭ unu homo.

„Vi savis al li la vivon", diras la barono, „sed ensŝlosigu lin!"

Kaj en malluma kelo sidas la trubaduro. Tri fojojn ĉiutage oni donas al li panon kaj akvon tra fendo en la muro. En mallumo li eĉ ne vidas la manon, kiu alŝovas al li tion .

* * *

„Ho, la malfeliĉulo!" ekĝemas la bonaj homoj, kiuj aŭskultis la rakonteton.

* * *

Kaj tamen — daŭrigas sian rakonton la poeto — li estis feliĉa. Ĉar felico estas en la povo agi. Kaj kiu — li pensis — estas pli forta ol li? Li ne estas heroo naskita, li ne portis batalilojn, regrajton de neniu li heredprenis, kaj tamen tremas pro li la kastelo, tremas ĝiaj regantoj! Oni tremas pro lia vorto, pro la plej mallaŭta sono de lia citro!

Li sidas en mallumo kaj lia animo banas sin en lumaplezuro: mi estas la fortulo, min unu ili ĉiuj devas gardi, ili, la fortaj, la armitaj, la regantoj. Kaj pasas for horoj, tagoj, semajnoj, monatoj kaj jaroj — li ne kalkulas ilin; li ne sentas la iradon de la tempo! Ĝiaj silentaj flugiloj ne tuŝas lian vizaĝon, kaj ilia bruo ne

*) Tiu ĉi rakonto estas traduki ajo el la juda literaturo de la plej fama juda klasika verkisto J. L. Perec. Entute, la juda literaturo estas preskaŭ nekonata al la Esperantistaro, kaj ni estas certaj, ke tiu ĉi rakonto donos pli malpli bonan imageton pri la ĉie fame konata literaturisto.

Danko de rusaj Samideanoj.

Pli ol 20000 gmk. donaco de usonaj samideanoj por rusaj malsatantoj.

Al „Esperanto Triumfonta“ kaj per ĝi al tutmonda Esperantistaro.

Kara redaktoro!
Kara Samideanaro!

Ni rusaj Esperantistoj kun dankego akceptas vian saluton enpresitan en n-o 67 de l' gazeto „Esperanto Triumfonta“.

Ni dankas vin, ke viaj pensoj pri nia lando ne disrompiĝis. Vere, ni longtempe estis disigitaj de la tutmonda Esperantistaro, longtempe en nian baritan landon nenia sciaĵeto alflugis, sed ni ne lasis nian postenon. Dum ĉi tiu disrompita periodo ni sukcesis progresigi nian karan lingvon. Ni sindonis al nia kara afero, kaj ĝi neniam estos de ni forlasita.

Kvankam ni estas malsataj, kvankam nia mizero kaj diversaj krizoj iam malhelpas al nia agado, — vere, ni ankoraŭ pli larĝe disvastigos nian karan lingvon por la baldaŭa triumfo, kaj ni kredas, ke nun kuniĝinte kun la tutmonda Esperantistaro kaj ricevante necesajn sciigojn per Esperantajoj, ankaŭ dank' al restariĝintaj interrilatoj, ni ĉiuj baldaŭ alvenos al la venko!

Kara redaktoro de ET, mi turnas min al vi, kiel redaktoro de „Antaŭen“, kun afabla petego, bonvolu enpresigi supre skribitan dank-alvokon en vian ŝatatan gazeton.

Kun antaŭa danko

A. P. Drozdov.

Esperanto Service Corporation

en New York, 500 Fifth Avenue, sendis al ni ĉekon por la sumo de 21518 germ. markoj kun la peto, ke ni ekspedu tiun sumon por la malsatantaj Esperantistoj en Ruslando. La mono estas donacita de jenaj personoj:

A. Trinkle, New York	dol	10.—
A. Christen, New York		10.—
H. W. Fisher, Perth Amboy		10.—
L. S. Ware*), Philadelphia		5.—
A. T. Post, Washington		5 —
E. B. Myers, Oakland, California		5.—
Amiko, New York		5.—
H. W. Hetzel*), Philadelphia		5.—
M. A. Maisch, Philadelphia		3.—
B. P. Mann, Washington		2 50
M. Cathrons, New York		2.—
C. K. Fosselmann, Washington		1.—
C. P. Ramos, New York		1.—
R. Carter, Brooklyn		1.—
N. Sadagursky, New York		1.—
A. S. Vinzent, San Francisco		1.—
J. D. Sayers, New York		1 —
Harmonio Club (kolekto ĉe barĉo)		29.15
	dol.	97.65

*) donacis ankaŭ vestaĵojn.

El tiu sumo estas elspezitaj 10 dol. por „food draft“ de la American Relief Administration (sendita al s-o Grafov, Arkadak, Saratovsk gub.) kaj 50 cendoj por la ĉeko, kiu reprezentas la kurzan valoron de dol. 87. 15.

Ni klopodos transsendi la monon kiel eble plej baldaŭ al niaj malsatantaj rusaj samideanoj.

Laŭ sciigo de Esp. Service Corporation ĝi esperas, ke la proksiman monaton ĝi povos sendi duan ĉekon, kvankam la sumo eble estos malpli granda.

Certe la noblanimaj donacintoj havos la dankon de niaj malfeliĉaj amikoj en Ruslando.

Laboristaro.

En Germanlando

aliĝis al GLEA jenaj novaj grupoj: Untertürkheim apud Stuttgart, Gladbeck en Vestf., Essen-Altendorf, Altenessen, Horst-Emscher, Landeshut en Silezio, Pegau en Saks. — Diversaj kursoj funkcias en Kassel kaj ĉirkaŭaĵo, en Mittweida, Siegmar, Grüna kaj aliloke.

Franclando.

En Villeurbanne kurso de la laborista grupo en la Unuiĝo de Sindikatoj.

Sukcesa laborista movado en Budapest.

La Laborista Esp. Societo bone laboras. En Budapest estas 21 kursoj, ĉiuj el ili kun pli ol dekkvin partoprenantoj. La Societo havas proksimume 500 membrojn en Budapest kaj ĉirkaŭaĵo, do multe pli ol la Landa Esp. Societo en la tuta lando. Kompreneble oni ne trotaksu tian sukceson. La laboristoj pro sia bonega organizeco povas en ĉiuj fakorganizacioj propagandi kaj havas, kiel plejparte unulingvuloj, sentantaj la neceson de alia lingvo, emon lerni. Kontraŭe la nelaboristaj Esperantistoj ne estas organizitaj, ne komprenas la efikon kaj necesecon de organizo, kaj multaj Esperantistoj ne estas en ia ajn societo. Ili ankaŭ ne laboras tiel konscie por Esperanto en siaj rondoj, kiel tion faras la plimulto de la laboristaro.

La diversaj laboristaj grupoj aranĝis en Budapest preskaŭ ĉiudusemajne iuloke kabaredon parte Esp. lingvan, kio servis ne nur por propagando, sed alportis certan profiton.

Fondiĝis laborista kantistaro-grupo, kiu partoprenis ĉe publika koncerto de la laborista kantistaro kun bona sukceso. Ankaŭ muzikorkestron fondis la laboristaj Esperantistoj. Samtempe, escepte de kelkaj fervoruloj, la tiel nomitaj „burĝaj“ Esperantistoj ne faras pli ol viziton de la kunvenoj kaj eĉ tion neregule.

Polico.

Esperanto kaj la policanoj.

Inter la policanaro en Berlin ekzistas granda intereso por Esperanto. Verŝajne estas eble enkonduki nian lingvon ĉe la Berlina policanaro, se ni povus montri al ili ke Esperanto en Germanio kaj eksterlando inter la policanaro faris bonajn servojn.

Por la referato, mi urĝe bezonas precizajn sciigojn pri la enkonduko de Esperanto en policaj rondoj, ĉu kaj kiaj kursoj jam okazis, statistikoj, oficialaj decidoj ktp.

Mi do estus tre danka al la samideanoj, se ili bonvolu baldaŭ sendi al mi detalajn sciigojn pri la ĝisnunaj spertoj kun Esperanto inter la policanaro.

Ing. *Julius Glück*,
Direktoro de la „Gefila“,
Berlin W., Potsdamerstr. 113.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Unuiĝo de rusaj Esperantistoj eksterlande estas organizata. Skribu al s-o A. Nedoŝivin, 4, rue du Nogent, St. Cloud (Seine), Francujo.

Franclando.

En Perpignan tri kursoj, el kiuj unu sub la protekto de la Politeknika Asocio.

Esp. Gruparo Berlin

aranĝis la 25. marto en salonego de Werner-Siemens-gimnazio en Schöneberg artan propagandan vesperon sub gvidado de s-ano d-ro Burkhardt; ĉ 400 vizitantoj. Nova kurso, gvidota de d-ro Burkhardt, komencos en aprilo.

En la teatro de la riĉeguloj (Nelson-Teatro) en Berlin iu artisto nun ĉiutage ŝerce atentigas la vizitantojn pri Esperanto.

En Breznik (Bulg.)

s-o Marin Hristov gvidas kurson kun 30 p.

Al sendintoj de artikoloj.

Multe da bonaj kaj presindaj artikoloj dormas en nia „redaktujo“. Neeble estas publikigi ilin tuj. La sendintoj estas afable petataj ne malpacienciĝi. Ni ne estas prokrastemaj, sed la loko ne permesas al ni publikigi ĉiujn bonajn manuskriptojn. Precipe artikoloj destinitaj por „Parolejo“, propagandaj artikoloj k. s. devas atendi. Tamen

literaturaj manuskriptoj

estas ĉiam bonvenaj. Kvankam ankaŭ tiajn ni nun povedas sufiĉe, ili ne antikviĝos, kaj ju pli multe da ili estos je nia dispono, des pli severe nia felietona redaktoro povos elekti kaj des pli bonkvalita estos nia felietono.

Solvo de la Premi-Enigmo el n-o 64

1. Hirundo	6. Dativo	11. Ario
2. Ameriko	7. Tuniko	12. Nikelo
3. Roko	8. Hundo	13. Droŝko
4. Aŭgusto	9. Islamo	14. Erinaco
5. Luizo	10. Lundo	15. Rokoko

La komencaj literoj formas la nomon de HARALD THILANDER.

Gajnintoj de la premioj estas: 1. Dim. Simeonov, Sofia; 2. Jan Kronenberg, Lomza (Pol.); 3. Walter Lippmann, Dresden; 4. W. Markuse, Berlin-Wilmersdorf; 5. J. Ravestein jr., Hago.

La premiitoj ricevos en la proksimaj tagoj po unu ekz. de „Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof“.

Gazetaro.

Sekvantaj gazetoj de Wien, Aŭstrio, enhavis artikolojn pri Esperanto: Illustriertes Wiener Extrablatt 9. 5., Morgenzeitung 9. 5., Abendblatt 8. 5., Tagblatt 28. 2, Der Abend 14. 5., Die Rote Fahne 9. 5, Arbeiter-Zeitung 9. kaj 16. 5., Deinicke-Listy 14. 5., Rakousky Obzor (ĉeha pedagogia revuo) 15. 5.

Nowa Reforma, Kraków, Pol., 16. 5. (Enketo de Ligo de Nacioj pri Esperanto.)

Volkszeitung, Bromberg, Pol., 25. 5. (Esp. anguloj.)

Il Sindacato Economico, Torino, marto. (Art. „Esp. kaj fervojistoj“.)

Vaba Maa, Tallinn, Est., 25. 5. (Art. pri enkonduko de Esp. en lernejojn.)

Päevaleth, Tallinn, 25. 5. (Art. pri enkonduko de Esp. en lernejojn kaj pri Estona Esp. Kongreso en Tartu.)

Le Journal, Paris, 14. 5. (En priskribo de Leipziga Foiro, la spec. korespondanto citas la uzon de Esp.)

L'Egalité, Villeneuve-St. Georges apud Paris, presigas regule pri Esp. artikolojn de s-o Lespicier.

Der Eisenbahner, Aussig-Krammel, Ĉsl., 17. 5. (Rubriko „Esperanto“.)

Reichenberger Zeitung, 24. 5. kaj 28. 5. (Artikolo kaj noto.)

Danziger Volksblatt, 29. 5. (Raporto pri adiaŭvespero por s-o Ketterling, prez. de Danziga Esp. As.)

Közep Duna, Budapest, 31. 5. (Parte en Esp.)

L'Etincelle, organo de Centro de Socialista Belga Instruistaro, 20 5. (Art. pri la Edukista Internacio, Esp. sekr. s-o Boubou; art. „Instruo de Esp. en lernejoj“.)

Gazette van Gent, 28. 5. (Esp. kurso.)

L' Express, Liège, Belg., 22. 5. (Anonco pri kurso de Esp.)

Recenzejo.

LIBROJ.

LEHR- UND ÜBUNGSBUCH DES ESPERANTO von K. Schönherr. 15. eldono. Ader & Borel, Dresden. 118 pg. 15½ : 21 cm. Prezo 15 gmk.

La libro jam de multaj jaroj estas regule uzata kun bona sukceso kaj konata kiel unu el la plej bonaj por germanlingvaj lernantoj, precipe tiaj, kiuj ne ĝuis altan instruadon. La nova eldono estas iom pli mallongigita kontraŭ la antaŭaj, kaj tio estas bona. Oni ne klopodu diri ĉiom en lernolibro, sed lasu ankaŭ iom por diri al la instruanto. Se la verkinto en estontaj eldonoj forlasus ankaŭ kelkajn regulojn, tio estus plua prefero de la bonega libro. Depost la unua eldono mi havis bonajn rezultojn kun la libro kaj tial volonte rekomendos ĝin al ĉiu, kiu ne gvidas galopkursojn. (H. H.)

THE ESPERANTO TEACHER. A simple Course for Non-Grammarians by Helen Fryer. Tenth Edition. B. E. A. Publications Fund N-o 5 172 pĝ. 10½ : 16½ cm. Eldonis Brita Esp. Asocio, London W C 1, 17 Hart Street. Prezo: broŝur. 1 ŝ. 2 p. aŭ 6 resp. kup.

Ĉiu anglo kaj anglalingvanoj dezirantaj lerni Esperanton kaj ne sciantaj fremdajn lingvojn trovos en tiu ĉi lernolibro tion, kion ili bezonos. La aŭtorino speciale atentis detalan klarigon de la gramatiko, sed tute ne troigis la pure lingvan vidpunkton. Ŝi celis kaj ankaŭ sukcesis doni ion praktikan, uzeblan kaj ne tro teorian. Multaj bonaj klarigoj faras la libron taŭga meminstruilo; angla-Esperanta vortaro kompletigas la enhavon modelan kaj neriproĉindan. Estus tre dezirinde, ke ankaŭ alilandaj eldonejoj aperigus tiajn praktikformatajn librojn senpene kunporteblajn en ĉiu vestpoŝo. Tre ofte mi jam aŭdis plendojn pri tio, ke oni ne povas uzi Esperantan libron kiel „Vademecum“ (iru kun mi) pro la granda formato. Kion utilas neenpoŝigebla libro portenda en la mano? Ni imitu niajn praktikajn anglajn amikojn.

G. Ajul.

GAZETOJ.

France-Esperanto. Marto. Adreso: M. F. de Menil, 51 rue de Clichy, Paris 9.
La Progreso. Marto.
Germana Esperantisto. Marto.
Esperanto Praktiko. Marto.
La Ligilo inter Kanadaj Esperantistoj. Febr. Unupaga hektografita folieto, eldonita de T. A. Allan, Montreal.
Espero Katolika. Marto. Adreso: Udenhout, Nederlando.
Internacia Pedagogia Revuo. Okt.-dec. Adreso: Boomsche Steenweg 444, Antwerpen, Belg.
Holanda Esperantisto. 25. marto.
La Eklezia Revuo. N-o 15 - 16.
Hungara Esperantisto. Marto.
Esperanta Finnlando. Marto.
Litova Stelo. Febr.
Esperantista Junularo. Febr.-marto.
Nova Eŭropo. Marto.
Der Arbeiter-Esperantist. Aprilo.
Egipta Esperantisto. Marto.
Bulgara Esperantisto. Febr.
Libero. Febr.
Kosmogloti. Marto.

KATALOGOJ, PROSPEKTOJ, AFIŜOJ, ktp.

AFIŜO pri III. Internacia Foiro Reichenberg, Ĉeĥoslovakio, 12.—20. aŭgusto 1922. Formato 75 : 47 cm. Tre efika kaj arta afiŝo en malhelblua, verda kaj ora koloroj. Unu el la plej belaj ĝis nun eldonitaj afiŝoj kun Esp. teksto.

FLUGFOLIO 4-paĝa de dana „Folkenes Forbund og Esperanto“. Kun malfermita letero de s-ino Mammen al la lerneja komisiono kaj urbestraro de Grenaa.

OCCIDENTAL. 8-paĝa franclingva gramatiko de la Lingue International de E. de Wahl.

Pri la konferenco de Genève

(precipe pri la pli gravaj paroladoj) ni ricevos stenografitan raporton, kiun ni publikigos kun ilustrajoj en du sinsekvaj numeroj. Kiu deziras

propagandacele

ricevi plurajn ekzemplerojn de la koncernaj numeroj, bonvolu jam nun mendi ilin; ĉe mendo de minimume 10 ekzemploroj al unu adreso ni liveros ilin je duona prezo (antaŭpago aŭ depreno de la konto).

---

tuŝas liajn orelojn — li nur sentas sian propran forton kaj sukcas el ĝi silentan kaj certan plezuregon! Pafilegoj kaj trumpetoj ne povas silentigi lian malfortan voĉon. Oni tremas pro li, pro timo oni enmurigis lin —

Li ne dormas, la barono! Landojn li okupis, kastelojn li ruinigis —, arbaroj tremas pro li kaj pro liaj estroj, kaj li tremas pro mi: dum la tuta tempo de mia vivo timigas lin sonĝoj, ŝanceliĝas lia trono, estas venenita lia peka vivo

Mi estas la forto!

* * *

Kiacele li rakontas tion? miras la bonaj homoj, kiuj alportis al la poeto la bonan sciigon. Kaj la poeto ripozas momenton kaj finas sian rakonton.

* * *

Ĉio maliuriĝas ĝustatempe! Kaj post multaj, multaj tagoj kaj noktoj vekas lin paŝoj en la vestiblo kaj tintado de fero.

Ili venas min mortigi! pensas la trubaduro kaj kun ĝojo estas ironta renkonte al la morto. La morto de fortulo estas pli forta ol lia vivo. Pro lia liberigita spirito ili pli multe tremos — mi venos al ili en sonĝo.

Sed li eraris.

„Ni venis vin liberigi!“ oni krias al li kun ĝojo kaj per fero oni dishakas la muron — ondo de lumo eniĝas — —

„Kiel li maliuniĝis!“ rimarkigas la liberigantoj

„Kiel blankaj estas liaj haroj!“

„Tamen la okuloj brulas!“

Sed la okuloj estingiĝas, kaj per rompiĝanta voĉo la trubaduro demandas:

„Vi volas min liberigi? Oni ne timas min plu? Ĉu tiel maliuna mi jam estas?“

Kaj la liberigantoj respondas:

„Ne timon oni havas pro vi: oni eksopiris je vi! Nun oni komprenas vin, kaj oni volas tion aŭdi el via propra buŝo! La barono mem rememoris pri vi . Li mem sendas nin al vi. Lia nomtago estas hodiaŭ, kaj ĉe lia tablo estas preparitaj, apud lia dekstra mano, honorseĝo por vi kaj oraj pokaloj sur la tablo. Kaj la korteganinoj diskuris en la ĝardenojn, por serĉi florojn por krono al vi destinita . Kaj la korteganoj kolektas monon, por ion donaci al vi — tiel alte oni ŝatas vin. Oni ekkonis vin — viaj kantoj el la valo estas kantataj ĉe la kortego “

„Iru kun ni, vi ĝisvivis vian feliĉon

„Mi ne scias,“ respondas la trubaduro, „kiom longe mi atendis la feliĉon, pri kiu vi parolas — mi ne kalkulis la jarojn; sed dum tiu tempo sovaĝe kreskis barbo kaj haroj . “

„Oni vin tondos kaj krispos kaj per bonodoranta akvo ĉirkaŭversos “

„Kaj disfalis miaj vestoj

„Novaj, per oro kaj arĝento broditaj vestoj atendas vin — iru, amata, kun ni — “

„Kiel mi povas vesti,“ daŭrigas sian plendon la trubaduro, „reĝajn vestojn, ĉar mia korpo estas malzorgita kaj malpura! Bonaj homoj, konduku min antaŭe al la rivero, kiu ĉirkaŭas la kastelon, kaj lasu min antaŭe bani kaj lavi!“

Kaj la bonaj homoj konsentis!

La trubaduro eniris en la riveron, sed li revenis neniam.

* * *

„Ĉu li dronigis sin?“ demandas la homoj timigite.

„Certe, jes!“

„Kial?“

„Por kio li plue vivus?“

El juda lingvo tradukis *I. Jurysta.*

Peto al niaj korespondantoj.

Por ebligi al la eldonisto de ET, uzi la helpon de aliaj personoj por la tre ampleksa laboro de redaktado, ekspedo ktp, estas nepre necese, ke ĉiu korespondanto aranĝu siajn leterojn tiaj, ke ankaŭ iu, kiu ne detale konas la ĝisnunan korespondadon, povu kompreni ĉion. Precipe oni skribu en ĉiu letero aŭ karto tre klare legebla: plenan nomon kun adreso. Ofte leteroj ne aŭ nur tre malfrue povas esti respondataj, ĉar la teksto ne estas legebla. Ni ankaŭ petas, doni al ni adresojn ne nur ekstere sur la kovrilo, sed ankaŭ en la letero mem. Jam kelkfoje okazis, ke alian tagon, postkiam la kovertoj jam estis bruligitaj, ni trovis en la letero la frazon: mian adreson vi trovas sur la koverto. Sed — ni ne plu trovis. Ĝenerale ni petas: Skribu klare, legeble kaj ne tro mikroskope!

Germanaj aĉetantoj de ET!

La plimulto de la gazetvendistoj — escepte kelkaj — pagas tre malrapideme. Iuj ricevis ET jam dum tuta jaro kaj ankoraŭ neniom pagis, tiel ke niaj kreditoj ĉe germanaj gazetvendistoj jam atingas preskaŭ 6000 markojn. Je 1. aprilo ni nun sendis al ĉiuj germanaj gazetvendistoj, kiuj vendas ET, detalan konteltiron resp. fakturon kun peto je pago. Al tiuj vendistoj, kiuj ne pagos ĝis fino de aprilo, ni ne plu liveros nian ĵurnalon. La regulaj aĉetantoj, kiuj en majo eble ne plu trovos ET ĉe la vendisto, bonvolu tiam aboni ĉe sia poŝtoficejo.

Antaŭ unu jaro ni aranĝis la publikan vendadon de ET por la celo de propagando; sed ni ne raitas endanĝerigi nian entreprenon, atendante eterne je pago.

Venko!

Plej alte en nia malluma ĉielo
Aperis steleto mirinde brilanta!
Homaron ĝi gvidas al glora la celo
Kaj iras antaŭen kun brilo konstanta.
Popoloj rigardas ĝin nune atente,
Kaj fratoj laboras por amo kontente.

Nubego migranta sub ĝi preterpasis,
Kaj homoj dubante pri sankta la vero
Erare la vojon signitan forlasis.
Malamo, divido, ekregis sur tero,
Ekridis kaj diris kun ĝoj' demonido:
„Mortintaj l' espero, la amo kaj fido“

Sed vento subita nubegon forpelis,
La verda steleto denove aperis.
Frateco malverajn projektojn ŝancelis,
Verfidaj amikoj ĉagrene koleris.
La fratoj fidelaj triumfis kun gloro
Kaj ree laboris kun fido en koro.

Kuraĝe la veron nun ili defendas
Sen tim' batalante por celo laŭdinda;
Kaj malgraŭ malhelpoj neniam ekplendas,
Ĉar ilin subtenas ja sent' admirinda.
Kaj ĉie nun vigle eksonas ĝojkanto
Pri venko de l' bela ligil' — Esperanto — !

Originale verkis *S. Frantz*, Paris.

Rekomendita de „Esperantista Literatura Asocio“

Nederlanda Anonima Societo

Luksapan-Fabrikoj

antaŭe **Henri J. Carels.**

50 Butikoj:

Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Lunĉejo Carels

63 Weimarstraat, Den Haag.

Oni parolas Esperanton.

Grave!

Por Ekspozicio

oni alsendu poŝtkartojn, leterojn, prospektojn, gazetojn kaj ĉiuspecan materialon al urba konsilanto **Jens Alby**, Bredgade, aŭ urba konsilanto **Christensen Suedker,** Bredgade, ambaŭ en **Grenaa,** Danlando. Oni celas devigan aŭ nedevigan enkondukon de Esperanto en la urbajn lernejojn.

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin sargas per la dissendo de cirkuleroj.

Prokuras komercajn adresojn.

Prizorgas la anoncadon en Nederlando.

Interrilatigas kun nederlandaj komercistoj industriistoj.

Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpaperoj.

La Interŝango

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondajoj, interŝangoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aligantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, **Béziers (Hérault), Francujo,** 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Internacia Antaŭkongreso

Augusto 1922.

Samideanoj el ĉiuj landoj estas kore invitataj.

Adreso Esperanto-Amt Danzig, Herrengarten-Kaserne

Importo. **Eksporto.**

Pollanda Komerca Agentejo

Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, speciale en teknikaj maŝinoj, manufakturo kaj galanteriaj artikloj; donas ĉiujn informojn pri la polaj komerclokoj.

Nur pograndaj firmoj bonvolu sendi ofertojn kun specimenoj aŭ katalogo.

Reprezentado. **Perado.**

De granda meblofabriko ni ricevis la mendon plekti

5000 Seĝojn.

Sed mankas al ni mono por aĉeti la bezonatan kanon. Kiuj vidantaj samideanoj bonvolos pruntedoni al ni blindulo] monon por aĉeti kanon? Ni ne volas almozon, sed nur prunton. Helpu al ni, por ke ni povu labori!

Blindul-Esperantista Grupo „Stelo"
Erfurt (Germ.)

Prez.: Kurt Filss, Erfurt, Hirschlachufer 22.

Boucon, profesoro: **Humorajoj.** (Kolekto de la plej bonaj spritajoj kaj humorajoj) gmk. 1.45

Azevedo, A.: **Amo per proverboj.** Trad. de A. Couto Fernandes. Unuakta komedio. La libreto estas tre rekomendinda al ĉiu Esp. grupo kaj tre taŭgas por la prezentado gmk. 2.40

Samideano N-o 1. Enhavas: P. Christaller, profesoro: Ascendo al Vesuvjo antaŭ kvardek jaroj (originalajo); Walter, M.: Surprizo (trad. Camilla Fürth); Stamatiadis, A.: La lasta kanto; Heinrich: Dum liberaj horoj. gmk. 4.20

Korespond-karto kun verda stelo „Esperanto" en sama koverto (9½×12 cm) gmk. 1.—

Sigelmarkoj (petu specimenojn)

Por altvaluta eksterlando 50% plialtigo.

Postulu la plej novan katalogon tuj de eldonejo

Oskar Ziegler & K-io

Marktredwitz (Bayern, Germ.)

Komerco kun Britlando.

Se vi volas aĉeti ion el Britlando, mi volonte helpos vin. Mi reprezentas grandajn fabrikejojn ĉiuspecajn. I. a.:

PINGLOJ.

Harry Heslop, komerca agento, Orrell House, Fairfield, **Bury,** Lanc.

Esperanta Finnlando

Internacia Revuo riĉe ilustrata.

Speciala informanto pri la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto.

Bonstila, nur Esperanta, interesa.

Necesega por ĉiu kongresano kaj por ĉiu nekongresano.

Prezo de jara abono:

1.25 dolaroj, 3.50 guldenoj, 5.— svedaj kronoj, 6.— danaj kronoj, ŝilingoj, svisaj frankoj, 7.— norv. kron., pesetoj, 15.— francaj kaj belgaj frankoj, 20.— liroj, 30.— finnaj markoj, 45.— ĉehoslov. kronoj, 50.— germanaj kaj litovaj markoj, rumanaj kaj bulgaraj levoj, 55.— dinaroj, drakmoj, 200.— hungaraj kronoj, 225.— estonaj markoj, latvaj rubloj, 400.— aŭstraj kronoj, 800.— polaj markoj.

Specialaj favorprezoj por kongresanoj.

Abonojn akceptas

Esperanto-Oficejo Finnlanda, Kasarminkatu 20, Helsinki.

MIA DREESBACH
MAX BUTIN
GEFIANĈOJ
Komitatanoj de Godesb. Esp. **Asocio „Godea"**
Godesberg (Germ.) Paskon 1922.

Eminentaj spertaj reprezentantoj
(el nia abonantaro)
deziras
transpreni reprezentadon de liverpovaj firmoj

je modo, teksaĵo, galanterio, teknika, kemia kaj papera fakoj, ankaŭ fotografaj artikloj, metodoj kaj novajoj ktp.

Proponojn peras la administrejo de

Meza Danubo (Közep Duna)

hungara komerca revuo
Budapest, V., Pozsonyi ut. 4.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto" (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postami 54
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Hr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉehoslovaka: Otto Sklenĉka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenau.
Estona: Est. Esp. Unuigo, postkast 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Cerono, Rambla Alvarez 12-2.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamaĉi, Aojama, Tokio.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smelių g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warazawa. (P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U. Ŝ. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj 0.20 dol., 0.50 hfl., 1 nord. kr., 1 ŝil., 1 svis. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 3 lir., 7 fmk., 8 kĉ., 25 gmk., 60 hung. kr., 250 pmk., 250 aŭstr. kr., internacie 5 stamp. resp.-kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkonto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

LA PLEJ FAMAJ SONORIL-KONCERTOJ en la tuta mondo okazas en Mechelen (Malines) apud Antverpeno en Belgujo. Petu informojn de: Inlichtingsbureel (Informoficejo), Bruel 125, Mechelen.

KURACIST-VIDVINO akceptos du junajn, klerajn alilandulinojn en sia domo. Plena pensiono kaj familia aligo. Bonega muzika kaj lingva instruado en la domo. — S-ino D-ro Hempel, Dresden, Germ., Zoellnerstr. 19.

POLAJ GEFERVOJISTOJ! Sudelik Stanislaw, stacio Koluszki, Pol. (Kongresówka) sercas konatiĝon kaj adresaron de ĉiuj Esperantistaj gefervojistoj en tuta Pollando.

NUMEROJN 2, 18, 21 kaj 26 de ET mi sercas kaj petas tiri prezproponojn al la administracio de ET sub „W.M.B."

RUSAJ SAMIDEANOJ! Bonvolu informiĝi per viaj gazetoj aŭ alimaniere, ĉu s-o d-ro Arnold Breier, estinta advokato el Hungarujo, estas vivanta! Liaj gepatroj scias nenion pri li jam de ses jaroj. Militkaptitoj revenintaj el Siberio rakontis, ke li estas en la urbo Omsk kiel intendanto ĉe la urba teatro. Liaj gepatroj estus tre dankemaj, se ili ekscius ion pri sia filo. — Informojn bonvolu direkti al s-o Alekso Buda, Rumanujo, Deva, str. Horea.

EKSPOZICIO de la XIV-a bezonas diversajn ekspozindajn Esperantajojn. Sendu donace (prefere) aŭ prunte al XIV-a Universala Kongreso de Esperanto, Helsinki.

APERIS LIBRO „La malbonaj flankoj de sporto"; 1 ekzemplero kostas afrankite 0.75 fr. aŭ belg. fk., 0.30 sv. fk., 1.25 it. lir., 3.50 kĉ., 0.25 sved. kr. — Mendu ĉe J. Vahtkerl, Postkontor, tuba 15, Tallinn, Estonio.

KURSO DE ESPERANTO POR GERMANOJ. Kolekto de „La Esperantisto", n-o 2. (Einführung in die Völkersprache Esperanto in 10 Stunden.) Prezo 5 gmk. aŭ 1 kĉ. Havebla ĉe la administrejo de „La Esperantisto" en Wien II, Postami 54.

FIDELEĈO KAJ ESPER'. Himno pri fideleco al Esperanto. Prezo: kanto kaj fortepiano 1 fr. fk. Havebla ĉe l' aŭtoro: S. Frantz, 21, Rue Alain-Chartier, Paris.

SIGELMARKOJN Esperantajn, insignojn, kaŭĉukajn stampilojn por societoj, poŝtkartojn liveras tuj Jozefo Kocoŭrek, gravuristo, Wien X, Arthaberplatz 3—14. Oni korespondas en lingvoj: ĉeha, germana, rusa kaj Esperanta. Postulu specimenaron de Esperantaj sigelmarkoj kontraŭ 2 respond-kuponoj.

PASTRO L. W. CRONKHITE, post kvardekjara laboro, eksiĝos sian misian laborkampon ĉe Bassein, Burma, en frua aprilo, por reiri al sia usona hejmo. Nova adreso: Greenwich, N. Y., U. S. A., kien li alvenos ĉirkaŭ la unua de junio. Li aparte bonvenos leterojn kaj poŝtkartojn ilustritajn montrantaj geinfanojn. Responde li sendos leterojn kaj Burmajn kaj Hindujajn kartojn.

PROGRESEMAJ EDUKISTOJ kaj interesataj samidealaj needukistoj, abonu vian revuon „NOVAJ TEMPOJ"! Pritraktas edukajn aferojn, propagandas pacemajn progresemajn ideojn, celas la pristudon de racia edukada sistemo. Monata, Esperante redaktata. Jarabonprezo 6 fr. fk. (malaltigita por nacioj kun malbona valuto). Petu specimenon. Sin turni al: Vittecoq, Sassetot par Bacqueville (Seine Inférieure), Francland o.

ARTAJ INSIGNOJ. „Agrable surprizita pri ilia ĉarma aspekto, s-o Poncet, vic-ĉefdel. de UEA en Lyon, varme rekomendas la artajn insignojn de f-ino Gérard, 9 rue d'Armaille, Paris 17."

Korespondo kaj Interŝango.

Eero Kakkonen, Karisalmi st., Finnlando, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.), leterojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (artaj) kun ĉiu landoj (precipe kun eksterEŭropaj) f-ino Ada Freundlich, Rzeszów, Pollando.

S-o Lazarz Berliner, Lodz, Pollando, Konstantynowska 42, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝangas poŝtmarkojn.

S-o Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Auerspergstr. 54, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

F-ino Wanda Malewska, Nawrot 7. m. 13, Lodz, Pollando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Edmund Swiderski, Ruda Pabjanicka, Lodz, Pollando, interŝangas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Eŭgenio Valkovskij, Bobrujsk, Mingub. Socialistiĉeskajastr. 198, Ruslando, deziras korespondi kaj interŝangi ilustr. poŝtkartojn, poŝtmarkojn, monerojn, gazetojn, jurnalojn, semojn ktp. kun gesamideanoj.

S-o A. Grimpel, Aseri, Estonio, deziras interŝangi poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

Italajn kaj francajn tralegitajn jurnalojn petas L. Fischer, Jaroslaw, Slowackiego 9, Pollando. Rekompence li sendos poŝtmarkojn aŭ polajn kaj germanajn gazetojn.

F-ino Germaine Kenens (16-jara), Schulstraat 57, Antverpeno, Belgiando, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj kun ĉiuj landoj; interŝangas ankaŭ poŝtmarkojn.

S-o Angel St. Nikolov, Lozenec 32, Sofia, Bulgario, deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun gelaboristoj, precipe komunistoj de la tuta mondo pri laborista movado kaj teknologio; sangas poŝtmarkojn kontraŭ maŝinaj katalogoj aŭ libroj en germana aŭ franca lingvoj.

S-oj Jan kaj August Treimuth, Tarto, Estonio, Vladimiri t. 3 k. 7, deziras interŝangi poŝtkartojn ilustritajn kun ĉiuj landoj.

F-ino Hanni Richter, Grottau 384, Ĉehoslovakio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun la tuta mondo kaj interŝangi poŝtmarkojn.

F. Savin, Astrahanj, Ruslando, str. Katoliĉeskaja n-o 5, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj kun la tuta mondo; kolektas Esp. muralŝojn, katalogojn ktp.

Socialistoj en la tuta mondo, sendu tuj vivsignon al kamarado Jens Alby, Urba konsilantarano, Bredgade, Grenaa, Danlando. Volonte ricevas propagandiloj n, presaĵ jn ktp. por ekspozicio; resendos ĉion laŭ deziro.

Fervojistoj, skribu poŝtkartojn aŭ leterojn al mi, por ke mi propagandu Esperanton inter miaj samfakuloj. Asisento Sorensen, Gerrildbanen, Grenaa, Danlando.

S-o Charles G. Stuart-Menteth petas, ke oni ne sendu al li migrantajn kartojn kaj ke li ne interŝangas poŝtmarkojn.

S-o Ichiro Aoki, 77 7 chome, Kami-Tsutsui, Kobe, Japanio, deziras interŝangi poŝtmarkojn kaj ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kun ĉiuj landoj, precipe kun Estonio, Latvio, Litovio, Polio kaj Prusio.

Japana studento, s-o Kiyosi Miura, Sin-karasu-Maru, Kasiracho 16, Kioto, Jap., deziras interŝangi ilustr. poŝtkartojn kun ĉiulandaj gesamideanoj.

Du energiaj filatelistoj, ankaŭ skoltoj, deziras interŝangi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Sendu 100 aŭ 200 poŝtmarkojn al Volmer Rosenkilde aŭ Arne Meldgaard N., ambaŭ en Grenaa, Danlando. Skribu pri Esperanto kaj Skoltismo en via lando.

S-o V. Bonde, Stenslund 2, Falun, Sved., deziras korespondi kun gebontemplanoj ĉiulandaj.

Wiljo Saaristo, Wiborg, Finnlando, deziras interŝangi pm.

S-o Aleksandro Fekecs, Budapest VI, Szondy strato 58-II-17, Hungario, deziras interŝangi poŝtkartojn ilustritajn (bfl.) kaj papermonon kun ĉiuj landoj.

S-o Otto Kummer, juna instruisto, Merseburg a. Saale, Friedrichstr. 14, Germanio, deziras korespondi precipe kun fraŭlinoj.

S-o Willy Wellepp, juna instruisto, Merseburg a. Saale, Haackestr. 2, Germanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj, precipe kun orientaj landoj, kiel ankaŭ prefere kun fraŭlinoj.

S-o Rudolf Bierlümpfel, Lauchstedterstr. 45, Merseburg a. Saale, Germanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj.

S-o Engelbert Schüffl, Plauen i. Vogtl., Germ., Hainstr. 4, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.)

S-o Rudolf Müller, Georgplatz 44, Brand-Erbisdorf (Saksujo, Germ.) sercas tutmondajn gesamideanojn por korespondi kun li pri ĉiaj aferoj. Li ankaŭ kolektas Esperantajojn.

S-o Kurt Klinger, Chemnitz, Sa., Germ., Annabergerstr. 55, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiulandanoj.

S-o Paul Hiller, instruisto, Neustadt O.-S., Unt. Mühlstr. 10, Germ., deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj (speciale geografiaj) kun ĉiulandanoj.

Filatelistoj! Mi liveras poŝtmarkojn de Germanujo, Memel, Saar, Allenstein, Silezio, Danzig, Bayern. Postulu preztabelon! S-o Schultze, Rogzow apud Köslin, Pommern, Germ.

La katolika societo petas gekorespondemulojn por siaj gelernantoj. Petoj direktotaj al la gvidanto de la kurso, s-o J. J. v. Wensveen, Warmoesstr. 118, Wormerveer, Nederlando.